

Adelbert von Chamisso,
Tragika historio

tradukita de N. N. 53

Malfeliĉulon kolerigis,
ke oni liajn harojn ligis
en plekto post la kapo.

L' aferon volis tuj korekti,
sed li neeblis ĝin displekti:
- ĝi restis post la kapo.

Li tial turnas nun rapide,
kaj provas preni ĝin avide;
- ĝi restas post la kapo.

Tuj tamen turnas duan fojon;
- la plekto sekvas saman vojon:
- ĝi restas post la kapo.

Li tiam ŝanĝas la direkton,
sed vane ĉasas sian plekton,
- ĝi restas post la kapo.

Turnkruce nun li turnas tiel,
sed li ekkaptas ĝin neniel:
- ĝi restas post la kapo.

Li turnas nun kaj turnos ĉiam,
dirante: "eble helpas iam!"
- ĝi restas post la kapo.

*Traduko de la Germana poemo "Tragische Geschichte" de ADELBERT VON CHAMISSO (*1781-01-30 – †1838-08-21) en Esperanton de N. N. 53 (Alceste).*

Arg-818-1641 (2013-02-04 23:06:04)

Esperantigis laŭ la origina germanalingva teksto: iu nekonata esperantisto, kies pseŭdonimo estis Alceste, ĉirkaŭ la jaro 1906. Vidu la retejon <http://www.literaturo.dk/tragika.htm>.